

Esperanto

La Skolta Mondo


angla	Wider Horizons
franca	Horizons Nouveaux
germana	Zu Neuen Horizonten
hispana	Más Amplios Horizontes
japana	ひろくを見 世界をつちかひ
kataluna	Una ampla Mirada
nederlanda	Ruim Zicht
norvega	En Videre Horisont

en preparo:
araba

آفاق جديدة

Esperanto

VASTAJ HORIZONTOJ



V-19563 / 5
(1979)



por Esperanto
kaj por Skoltado

Ĉu ĉi tio
estas la plej
grava evento de
skolta esperant-
ismo?

Tio dependas de VI!

jul - sep 1978

vol. 5
nr-o 11

S E L

SKOLTA ESPERANTO LIGO

Postbus 433

1500 LZ Zaandam Nederlando.

Poŝtĉirkonto 54 36 47

Fondinto "Avoto", A.W. Thomson.

Kunfondinto: J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj:

Avoto, D.H.Davis, L.J. VanGulck.

Prezidanto: John Berggreen, Grattvoll-

veien 23c, Oslo 11, Norvegujo.

Telefono 02-283035

Sekretario: J.K. Hammer, Taxusstraat

7, 1505 AA Zaandam, Nederlando

Telefono 075-166931

Kasisto kaj Administranto de L.S.M.:

David H. Withey, 21 Brookfield Ave.

Waterloo, Liverpool L 22 3ye,

Britujo. Telefono 051-928-2936.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach,

Bambleveien 2, 3700 Skien, Norveg-

ujo. Poŝtkto 8030413, Tel 035-21848.

Membroj de la Centra Komitato:

Allan Fineberg, 76 Seventeenth

Ave., Paterson, NJ 07531, Usono.

Ŝindo- Scitaro, Nisi-mikuni-1-

tyōme 200, Higasi-yodogawa-ku,

Osaka-si, Japanujo.

Skolta Esperanto-Ligo eldonis:

Jamborea Lingvo (lernolibro).

Skolta kaj Jenduma Terminaro.

Jamboreaj Notoj (preparolo de la

14 ĝisnunaj jamboreoj. Esp. lingva)

Jamboree Story (Sama en angla)

Pli vasta horizonto (informa kaj

ideo-dona libreto eldonita en la

lingvoj angla, araba, franca,

germana, japana, hispana, neder-

landa kaj norvega.)

Jam la somero pasis, kaj septem-
bro alvenis. Mi ne scias, ĉu la
somero por vi estis suplena aŭ
pluva, sed mi esperas, ke vi nun
havas laborfortojn kaj kuraĝon.

Mem mi spertis, ke eĉ se la ferio
ne iĝis tia, kia vi ĝin planis,
ĝi povas fariĝi riĉa, eble eĉ
pli ol vi kredis.

Ni volis al banstrando, sed tio
fiaskis pro la vetero. Sed pro
tio ni povis viziti multajn lo-
kojn, kiujn ni en aliaj someroj
preterpasis, nur.

Kaj mi pripensis la fakton, ke
ni tro ofte preterpasis - vidas,
sed tamen ne vidas. Iel estas ne
nur pri grandaj vidindaĵoj, sed
eble eĉ pli kiam temas pri la tro
neatentitaj mirindaĵoj en la na-
turo.

Ni devus proksimiĝi pli alla na-
turo, genufleksi por rigardi per
malfermitaj okuloj, aŭskulti per
malfermitaj oreloj, kaj ne, per
ĉiaj artefaritaj sonoj, detru-
i la silenton de la naturo, kaj la
lingvon de tiu silento.

Al mi tio ankaŭ diras ion pli: Ne
nur la naturo, kiun ni povas vi-
di per la okuloj kaj aŭdi per la
oreloj, sed ankaŭ la realaĵoj,
kiuj estas ekster nia percepto,
devas esti objekto de nia inter-
eso.

Tro ofte ni nur kapskuas kaj neas
kaj tial perdas la spiritajn kaj
religiajn riĉojn.

Kio okazus, se ni haltus, se ni
vizitus, se ni rigardus - kaj ne
nur, kiel kutime, preterpasis en
nia trourĝo?

Eble nia tuta vivo fariĝus pli
riĉa?

Hans Amund

Ni vivas!

Se iu fakte dubis je tio oni havas la pruvon en la apuda bildo kaj en la aliaj bildoj kiujn sendis la NR de Italujo, Fr Abriani, el la kursoj en Verona.

Sed ankaŭ aliaj faktoj atestas pri tio:

Letero el Peruo (de la NR) atestas pri kursoj, en kiuj ĉeestas kvar skoltaj, kaj ili promesis disvastigi siajn ideojn en siaj grupoj.


Letero el Ĉeĥoslovakio (Uher) rakontas, ke skoltismo travivas, eĉ se ĝi ne povas publike ekzisti.

Letero de Pollando (Dariusz Aleksander Szostak, 91-033 Lodz, ul Inowroctawska 16 m 14). Li estas instruitoro de la "Pola Skoltisma Unio", kaj li "volus scii, kion faras skoltaj liĝoj en la mondo", kaj ankaŭ "volus korespondi kun skoltaj", kaj salutas nin per "Czuwoj", kio signifas "Estupreta".

Ankaŭ el Nederlando venas peto pri korespondo: La patrolo de Harold van Dijk bonvenigas salutkartojn kaj deziras interŝanĝi leterojn. Adreso: Voltastraat 13, Amersfoort, Nederlando.

Kaj el Italujo ni havas strangan, amuzan, admonon:

Kiuj du blondaj junulinoj, prefere skoltinoj, volas kaj povas kunlabori en "Sankta Luĉia"-festo en Verona, Italujo, la 13-an de decembro? Inter alie temas pri disdonado de ludiloj al malriĉaj infanoj. Skribu al s-ro Franco Abriani, Via Falconetto 24, 37131 Verona, Italujo.



Gaja dancado ĉirkaŭ la NR de Italujo - inter la ekzamenoj de matematiko kaj naturscienco! Esperanto, evidente, ĝojigas ankaŭ la plej maltrankvilajn el la studadajn provojn!

por helpi

Estas multaj homoj kiuj pli ol volonte helpas - se ili scias, kian helpon ili povas doni. La ĝenerala sekretario tial ellaboris la sekvajn konsilojn pri utilaj helpoj al SEL. Kaj se iu ne povas fari multon, tiu tamen eble povas helpi per unu punkto.

Kompreneble: SEL - pere de la landa NR aŭ pere de la ĝenerala sekretario - deziras scii pri tio kio okazas, ne malplej por prepari sekvajn paŝojn, kaj ni pro tio petas pri raportoj aŭ informoj.

Kaj jen la naŭ sugestoj:

1. Kontrolu ĉu okazos ia (inter)

Alia informo, ankaŭ el Italujo, atingis nin tre malfrue por esti preparolata antaŭ la aranĝo, sed ni esperas je positiva raporto: Temas pri skolta labortendaro en aŭgusto en la "Esperantujo", itala kampadejo de SEL, kaj elfosado de partoj de antikvaj stratoj kaj muroj, por trovi pruvojn, ke la huno-reĝo Atilo la terura, tie organizis sian militon kontraŭ i.a. la papo Leono I.

Fl Usono (Conrad Fisher) venis letero kun informoj pri la nova NR, s-ro Bob Rapp: Li (Fisher) kune kun sia edzino vizitis la nacian jamboreon. "Ni unue iris al "Midway of Merit Badges" (Konkurso de fakinsignoj), kie la unua budo estis pri "SOSSI" (societo pri skoltoj sur poŝtmarkoj). Mi vidis viron, kiu prelegis pri SOSSI al la knaboj kaj viroj, kiuj haltis por rigardi lian ekspozicieton. Antaŭ ol mi povis atingi lin, li vidis min kaj tuj ekkriis "Scouts Esperanto League! I used to belong but I lost contact with it" (Skolta Esperanto-Ligo! Mi antaŭe apartenis, sed perdis la kontakton.) Li (Rapp) servis kiel "publikrilat-oficisto" de SFL en la tempo kiam Stan Otto estis NR. Nun li jam eldonis malgrandan faldfolion pri la ligo en la angla lingvo.

Ankaŭ aliaj ŝanĝoj estas en la listo de Naciaj Reprezentantoj.

En Portugalujo Maria Teresa Nunes Constância en Aqualva - Cacem akceptis la inviton, kiun Jaime de Matos Carreira faris al ŝi, por transpreni la taskon.

Kaj en Svislando, post dekoj da jaroj ni fine (daŭr p 113)

nacia skolta kunveno en via lando. Organizu tie propagandon por SFL, ekzemple per la libreto "Vastaj Horizontoj". Ne forgesu kunlabori kun la NR!

2. Sendu ekzempleron de la libreto "Vastaj Horizontoj" al redaktoro de ia nacia, regiona, loka skolta gazeto, kaj petu recenzon. Ne forgesu raportial la NR.

3. Serĉu kontakton kun la komisaro pri "internaciaj aferoj" de via Skolta Asocio. Petu lian kunlaboron. Atentigu lin pri la valoro de Esp. por la Skoltado. Kunlaboru kun la NR, kaj sendu raporton!

4. Kontrolu, ĉu ekzistas en via lando adreso kie skoltoj povas ricevi informojn pri SEL, kaj mendi ĝiajn eldonaĵojn (daŭr p 113)



Gaja fino de la Esperantokurso de la loka klubo en Verona, Italujo. Inter la kursanoj estas pluraj membroj de SEL. La pliaĝa sinjoro estas prof GALBUSERA, redaktoro de Katolika Sento.

Kion neniu fidis:

De Per
Gottschalk

Mikeno, la orolando de Homero.


Hodiaŭ larĝa, moderna ŝoseo kondukas inter Ateno kaj Mikeno, okcidenten en la komenco, ĉe Korinto abrupte suden. La apenuaŭ 150 km per aŭto postulas paron da horoj, nur, se oni volas kaj urĝas. Domaĝe, ĉar survoje trankvilo decus por vidi ĉion - sed kiu povas

vidi ĉion en tiu ĉi lando tiel riĉa je memoraĵoj el la pratempe? Ni tamen permesas al ni deflankiĝon al Nemeo kie oni ankoraŭ povas vidi la kavernon en kiu la leono iam vivis. Ĉi tien la heroo Heraklo, la filo de la reĝdio Zeuzo, alvenis, ĉi tie li faris la unuan el la dekdu heroaĵoj mortigante la fibeston kiu jam dum longa tempo furiozis en la regiono. Ek de tiam Heraklo

portis la leonokapon super sia propra kaj la pied-

egojn krucigite super sia granda brusto.

De Nemeo estas nur mallonge ĝis la distanco al la pensiono ĉe Mikeno, kiu donis loĝejon al tiom da famuloj ek de Heinrich Schliemann en la lasta jarcento.



La leonokapono de Mikeno.

Iam ĝi estis centro por vojaĝantoj sed nun estas preskaŭ forgesita inter la ĝigantohoteloj, tamen ĝi ankoraŭ portas la nomon "menelaoso", kaj la gastiganto nomiĝis Agamemnon. Tio tamen estas same natura, kiel nia renomigo per la reĝaj nomoj Harald aŭ Håkon.

Agamemnon ofertas tranoktadon kaj regalas per abunda, greka manĝaĵo, al kiu oni trinkas "Sangon de Heraklo", riĉan ruĝan vinon kiun oni devas ĝui singarde Ne forgesu trarigardi la gastoregistron ĉar ĝi respingulas multon el la historio de la arkeologio ek de plej fruaj tagoj. Kiam ili skribis la nomojn, ili ankoraŭ estis junaj kaj nefamaj, nun pluraj mortis, kaj kelkaj havas mondfaman nomon.

Post la manĝo ni ekiras al la urbo kaj kastelo, kiuj banas sin per ora suno. Grizo en grizo kaj ŝtono sur ŝtono - tiamaniere salutas nin Mikeno, la urbo, kiun Homero nomis la ororiĉa, la urbo kiu falis de glora periodo antaŭ pli ol 3000 jaroj al nenio, al ruinamaso kia ĝi hodiaŭ estas.

Sed iam estis, la fabelo komenciĝas - kaj la fabelorakontanto estas Homero, la blinda kantisto kaj poeto kiu kreis la Iliadon kaj Odiseon. En Mikeno ni spertas la homeran epokon, kiu tamen ne estis en la tempo de Homero, sed pli frua en la tempo de saĝoj kiuperdiĝas en la nebulo, kiu laŭ nia kredo estis nur elpensadoj de homoj.

La reĝo nomiĝis Agamemnon, kaj li estis pli potenca ol iu ajn. La nomo de la reĝino estis Klytaimnestra, kaj ili navas tri infanojn. Ĉu iline povus vivi en riĉo, superfluo, feliĉo kaj harmonio?

Sed Mikeno preparas sin al milito, ĉar la frato de Agamemnon, havis edzinon Helena, kaj ŝi, la plej bela, forrabiĝis de la princo Pariso el Trojo. Kiel ĉi tio okazis, ĉu kun la konsento de la

dioj?

Jes, fakte, ĉar Afrodito kunagis. La afero estis jena: La superbela Helena havis multajn svatantojn, kaj fine elektis la reĝon Menelaoso el Sparto. Sed en unu tago kreiĝis embarase en la difamilio sur Olimpo, ĉar la diino de konfliktoj, Eris, ĵetis oran pomon al la ĉestantaro

per la vortoj: Al la plej bela!

Terura interdisputado

sekvis, kiu estas la plej bela, kiu meritas la pomon? Ĉu la fratino kaj edzino de Zeuzo, Hera, aŭ Ateno, la diino de tiu urbo, aŭ la diino de amo, Afrodito?

Kaj kiu juĝos? Alvokiĝis la princo Paris el Trojo, li juĝu - kaj li donis la pomon al Afrodito, ĉar ŝi promesis al

li, ke la plej bela inter teraj virinoj apartenu al li. Princo Paris venis al Sparto, renkontis reĝinon Helena, la plej bela inter virinoj, kaj la reĝo mem, Menelaoso, estis for! La bela princo venkas la reĝinon, kaj ŝi iras kun li - al Trojo.

Pro tio fariĝos milito, la bela Helena devas esti rekondukata al la reĝo de Sparto. Kaj en printempa mateno reĝo Agamemnon kun akompanaro rajdas de Mikeno tra la urba pordego. La akompanaro estas granda, ĉar la reĝo elektiĝis komandanto de la militiro kontraŭ Trojo.

La pordego ankoraŭ troviĝas - la Leona pordo. Verŝajne konstruita kune kun la murego ĉirkaŭ la kastelo, iam ĉ. 1400 a. Kr.

Ĝin ni trairas. Estas granda evento stari ĉi tie, apud ĝi, sub ĝi. Kiam urbo kaj kastelo malaperis kaj nur la ŝafistoj



Ora masko el reĝtombo en Mikeno.

Kion Schliemann elfosis ekster la muroj kaj la leonopordo de Mikeno.


kun sia brutaro vagadis tie, oni ekkredis ke ne manoj de homoj, sed kikoploj, unuokulaj gigan-

gantoj, kun enormaj fortoj, konstruis ĉi tiun pordon el la grandegaj ŝtonoj. Tamen, homoj konstruis, homoj kiuj posedis pli grandan teknikon ol la postaj generacioj, kaj ankaŭ posedis volon por vivi kaj pluenvivi.

Ni haltu ĉe la leonopordo. La enirejo mem konsistas el kvar enormaj ŝtonoj, kiuj pezas po plurajn tunojn. Sur la supra staras la triangula ŝtono, kiu donis al la pordo la nomon. La bazo de ĝi similas al altaro, kaj eble funkciis tiel, kaj de tiu sin levas kolono, la plej aĝa greka kolono, kiun oni konas. Apud ĝi du leonoj, kiuj staras kun la antaŭaj piedoj sur la altaro, kaj kun la perditaj kapoj turnitaj al la supro de la kolono. Tia estas la imponega leonopordo, drama per sia pezo, kun nekontraŭstarebla potenco radianta el la vivplenaj bestokorpoj. Tiel ĝi estis simbolo de necedebla venkemo - kio gvidia al la falo de Trojo.

Tra tiu ĉi pordi forraĵdis la reĝo Agamemnon, ĉi tie li adiaŭis al la reĝino kaj al la amiko Aigisto, al kiu li konfidis la taskon gardi la domon kaj familion dum li mem forestis.

Sed malantaŭ la muregoj?



Ĝis ĉe antaŭ cent jaroj oni opiniis, ke la homeraj poemoj pri Mikeno, pri Trojo, ke ĉio ĉi tio estis nur produkto de la cerbo de poeto, sen fono en la realaĵo. Germana komercisto, Heinrich Schliemann, kun la Iliado kaj la Odiseo en la manoj, trovis kaj elfosis Trojon mem kaj montris tion al la sciencistoj. Li pruvis, ke la urbo de Homero estas historia realaĵo. Kaj poste?

Jen li metas la fosilon en la tero de la urbo Mikeno la 7-an de aŭgusto 1876, kaj ĉi tiu needukita arkeologo denove faras gravajn trovojn. Li elfosas tombojn malantaŭ la kastela murego, precize kiel iu vojaĝanto ĉ 150 p Kr priskribas tion.

Tiu vojaĝanto estis greko, Pausanio, sed nia tempo ne volis fidi al tiu unua turisto. Tomboj, reĝaj tomboj, ne povas troviĝi interne de la urba murego. Neeble! La mortintoj en la pratempo ĉiam troviĝas en siaj propraj urboj, en la nekropoloj. Do, tomboj interne de la murego de Mikeno kiel Pausanio priskribas, neniam! Sensencaĵo! Sed Schliemann elfosis precize tie, kie priskribas Pausanio, kaj trovas reĝotombojn. Montriĝis, ke la urba areo iam plivastiĝis, nova urbomuro konstruiĝis kaj la malnova tombejo fariĝis parto de tiu nova areo. Kaj jen tie estis la reĝotomboj

Kaj jen ni estas interne de la leonopordo kaj la kiklopaj muregoj kiuj iam faris la kastelon nekonkerebla. Tuj malantaŭe estas mizeraj restaĵoj de grenejo kaj armilejo. Pli alte ĉe la altaĵo loĝis oficiroj, nobeluloj kaj pastraro, en komfortaj domoj. La ordinara homo vivis ekster la muroj - dise sur la ebenaĵoj kaj proksimaj montoj. Ankaŭ tiu distrikto ĉirkaŭiĝis per muro, sed ĝi tute malaperis.

Interne de la urba murego tamen la luksa

vivo apartenis al superklaso, kies pompanbrilecon Homero priskribis - sed neniu fidis. Neniu krom Schliemann. Nun ni per propraj okuloj povas vidi la trezorojn, kiujn li trovis, en la nacia muzeo en Ateno.

Unue li ekfosis metron post metro, kaj en iu tago trovas la unuan tombon. Li pravis, la entusiasmulo Schliemann. Kaj Homero. Kaj Pausanio. La tomboj estis tie, interne de la murego, kaj interne de ŝtonaro, kaj profunde, ĉar ili estis tre malnovaj. Schliemann trovis entute 6, ĉiuj reĝaj. Ĉar la mortintoj havis neverŝajnajn trezorojn. Oro, oro. Oraj beligaĵoj, oraj zonoj, oraj butonoj, oraj kaj arĝentaj vazoj, - krome vazoj el alabasto, perloj, sukceso.

Sur 17 mortintoj la elfosantoj trovis pli ol 13 kg da oro. La amatora arkeologo staris je la celo de siaj deziroj, kaj proklamis al la mondo ke li trovis la tombon de Agamemnon, kaj ke la vizaĝon kovris ora masko kaj la kapon kronis diademo.

Ni forlasas la areon de tomboj kaj iras laŭ la kruta kaj malvasta vojo al la supro, kie la akropolo, la reĝa palaco, estis. Hodiaŭ konfuziĝo da ruinoj el multaj tempoj, sed lertaj arkeologoj lokigis la tronsalonon, koridorojn, magazenojn, halon kun nomo megaron, - eĉ ruĝan banĉambron. Kaj plej supre kolonohalo kun super-rigardo super la tuta ĉirkaŭa pejzaĝo.

Ĉu Schliemann vere trovis la tombon de Agamemnon? Ne. Entusiastoj similas al entusiastoj - li ofte kun trorapido kaj ĝojo konkludis. La tomboj kiujn li trovis datumiĝas al ĉ. 1600 a. K., t.e. ĉ kvarcent jaroj antaŭ Agamemnon kaj la Trojo-milito.

Sed la merito de Schliemann estas nevelkebla, ĉar li trovis la oran landon de Homero, Mikeno. Li elfosis kulturon nekonatan, al kiu neniu ja fidis, kaj malfermis al ni tute novan mondon, kaj donis al ni pasintecon poste vastigitan de la anglo Evans, kiu tiris Kreton en nian rondon kulturan.

Ekster la murego de Mikeno estas kupolaj tomboj, unu el kiuj false nomiĝas la Trezorejo de Ateno. Tiuj estas de la tempo de Agamemnon sed tiuj estas jam de longe rabitaj, kaj neniu nun povas imagi la grandegajn riĉaĵojn, kiuj iam troviĝis en ili.

Dum dek jaroj la milito ĉe Trojo furiozis. Sed en iu tago eklumas la fajregoj kiuj montras ke la milito finiĝis, la venkanto hejmenvenos. La reĝo Agamemnon venas kun granda akompanantaro al la leonopordo, kie renkontas lin la reĝino Klytaimnestra. Li malfidis kun sia amantino Cassandra, ŝi malfidis al li kun la amiko Aigisto. Kaj kiam la reĝo en la vespero iras bani sin, la reĝino mortigas lin kaj Kassandran. Ĉu en la ruĝa banĉambro, trovitan de la arkeologoj?

Sed la venĝo estas proksima. La filo de Agamemnon kaj Klytaimnestra, Oresto, revenas al la urbo Mikeno, kaj li mortigas sian propran patrinon kaj ŝian amaton. Estas rakontate, ke post


tiu fiago Oresto fariĝas reĝo de Mikeno, kaj la forfalo komen-ciĝas.

Ĉ. la jaro 1100 a. Kr. la urbo kaj kastelo falas, venkitaj de sovaĝaj gentoj el la nordo, - tiaj, kiuj volas ĉion pro nenio. Kaj poste Mikeno neniam retrovas la iaman gloron. El la ororiĉa urbo restas nur ruinoj - ŝtono apud ŝtono.

La leonopordo restas, kaj simbolo montras, ke potenco ne estas ĉio, potenco ne estas la vojo. La kikoplaj muregoj parolas sian lingvon - kune kun la reĝaj tomboj kaj la kupolaj tomboj.

Jen ĉio.

La supran artikolon ni kun ĝojo kaj danko prenis el la Norvega gazeto Morgenbladet kun afabla permeso de la redakcio kaj de la aŭtoro. Nian plej koran dankon.



la lasta lernotago en ŝtata mezlernejo " M. Mezza" en Verona

La internaj instruistoj: s-roj Imerio Mariotto, Armando Vesentini kaj nia N.R. Fr Abriani pozas kun la esperanta sekcio.
5.VII.1978.

(daŭrigo de p. 108)

denove havas Nacian Reprezentanton. S-ro Erik Otte promesis fari sian eblon. Li estas ankoraŭ iom juna - sed ni feliĉas pro lia helpo, ĉar jam tro longe ĝenis nin la fakto, ke mankas SEL-kunlaboranto en la lando kiu ludas tian gravan rolon en la Skolta Movado!

Ni deziras ĉian sukceson al tiuj novaj kunlaborantoj, kaj esperas, ke ili per sia laboro trovas personan ĝojon samtempe kiam ili faras utilon al la ligo.

En Varna, tamen, ni ne sukcesis montri vivon. Dum la Universala Kongreso neniu membro de la "Centra Komitato" povis ĉeesti, kaj ni ankaŭ ne sciis pri iu alia membro, kiu faros tion. Tial ni bedaŭrinde devis decidi, ke la tradicia kongresa kunveno de SEL ĉijare ne okazos.

Ni pardonpetas al la sufiĉe granda grupo de amikoj de SEL kiu tamen venis al la salono. Kelkajn semajnojn antaŭ la kongreso ni jam avertis al la Loka Kongresa Komitato. Ni ne scias, ĉu la letero eble ne atingis ilin, aŭ ĉu ili ne atentis ĝin pro la multegaj okupoj dum tiuj nervostreĉaj tagoj, sed ni nur povas konstati, ke la sciigo ne atingis al la kongresanoj....bedaŭrinde!

El Usono (Stan Otto) ni ankaŭ ricevis leteron, kiu montras, ke iuj legas nian revuon. Iemas pri tiu rubriko sur la dua paĝo, kie la redaktoro esprimas siajn pli-malpli privatajn pensojn. Kaj la letero donas kaj pli grandan kuraĝon al plua laboro, kaj promesojn pri estonta helpo de tempo al tempo. Se nur multaj tiaj leteroj venus!

Kaj fine: Nia eldonaĵo "Vastaj Horizontoj" atestas pri la vivoforto de nia ligo. Ni esperas, ke vi jam

(daŭr de p 108)

en facila maniero. Kontrolu, ĉu la adreso estas konata en skoltaj medioj. Se ne, penupli-bonigi tion.

5. Elektu korespond-petojn de junulojn Esperantogazetoj. Traduku ilin por skoltaj gazetoj kaj naciaj korespondkluboj. Tio estas tasko, kiun vi regule povas plenumi.

6. Sendu materialon al nia gazeto "La Skolta Mondo" Povas temi pri raporto, rakonto, desegnaĵo, foto aŭ tradukaĵo...ktp. La redaktoro povas eventuale plibonigi lingvaĵon aŭ mallongigi, fortranĉi ktp.

7. Traduku konvenan artikolon el La Skolta Mondo por via nacia (regiona) skolta gazeto. Aldonu, ke ĝi tradukiĝis el la lingvo Esperanto, kaj

konatiĝis kun la libreto kaj ties konsiloj pri internacia skolta laboro. Jam ĝi aperis en ok diversaj naciaj lingvoj. La lasta estis la kataluna eldono kun la titolo "Una ampla mirada", kiu post longa prepartempo finfine pretiĝis en julio. Jam baldaŭ du novaĵ eldonoj aperos.

En Svedujo oni nun pretiĝas la libreton "En Vidare Horisont", dum en Italujo la titolo estos "Ampliare l'orizzonto". En ambaŭ tiuj landoj la Nacia Esperanto-federacio donas gravan kaj valoran helpon.

Nur pri la eldono en la araba lingvo ni ne estas tiom sukcesplenaj. Ni tre esperas pretigi ĝin antaŭ la jamboreo en Irano en 1979, sed ĝis nun la teknikaj problemoj estis tro grandaj por ni. Tamen kun kuraĝa persisto ni daŭrigas niajn klopodojn.

Esperable ĉiuj membroj nun utiligas unu el la eldonoj por kontakti la skoltaron pri Esperanto!

citu la fonton LSM, sed evitu superfluaĵojn propagandajn aldonejojn, kiuj impresas malbone. Ne forgesu sendi ekzempleron de la rezulto, aŭ almenaŭ raporto pri ĝi, al la redaktoro de LSM.

8.

Zorgu, ke la vorto Esperanto aperas en ĉiu adreslibro aŭ telefonlibro de via urbo aŭ organizaĵo.

Zorgu, ke Esperanto estu la unua parto de la titolo de la organizaĵo por kiu vi laboras

9.

Provu plibonigi la organizadon de SEL en via lando. Pri tio



Jen: Disdono de SEL-diplomoj en Verona, post kurso, - antaŭ festo!

Kaj jen la absolute lasta el la multaj kaj longaj informoj pri la vivo de nia ligo kaj de la membroj:

El Norvegujo (aŭ el Svedujo aŭ el Malto!): Nia redaktoro nun regule paroladas en IBRA radio en mardaj vesperoj. La radioelsendoj estas de la pentekostanoj, sed do ankaŭ donas eblecon al aliaj, kaj sendas en ondlongo 50,17 m (= 5.980 MHz) je la 21.30 Mezeŭropa tempo en mardoj.

nia gazeto poste donos konsilojn, sed vi jam nun povas skribi al la NR, aŭ se tia ne ekzistas, al la adreso de SEL en Nederlando.



- Aŭstrio f-ino Eva-Marie Fraunhofer, Badenerstr 7, A-2512 Tribuswinkel/Baden pr. Vieno.
s-ro Franz Schwärzler, Rathausstrasse 2, A-6900 Bregenz.
- Belgujo s-ro L.J. VanGulck, Lt. Lippenslaan 33 bus 10, B-2200 Borgerhout.
Poŝtk. to Belga Skolta Esp. Sekretario 000-0327460-85. Tlf 031-3688.08
- Brazilio s-ro Adonis Marcelo Saliba Silva, caixa postal 192, 35130 Acesita Mj.
- Britujo s-ro David H Withey, 21. Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool L 22 3ye.
- Danlando s-ro Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, DK-2600 Glostrup.
- Finnlando s-ino Irja Klemola, Nunna, SF-20660 Littoinen.
- Francojo s-ro Patrick Deveughelè, 53 Av de Rigny, Appt 64, F-94360 Bry sur Marne.
- Germanujo s-ro Georg D Winkler, Haroldstrasse 47, D-41 Duisburg 1.
- Hispanujo s-ro S. Aragay Galbany, Bassegoda 40-3-1, Barcelona 14. Tel 333 80 81.
- Irlando s-ro Frank Dobbs, 8 Ailesbury Grove, Dublin 4.
- Italujo s-ro Fr. Abriani, Via Falconetto 24, I-37100 Verona. Tel 045-525173.
- Japanujo s-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K. 16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.
- Kanado s-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest Ont.
Helpa NR: s-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb.
- Nederlando s-ro B.J. Wijmer, Vreebos 41, Zoetermeer/2280. Tel 079-215868. Poŝtkto. 3335470.
- Norvegujo s-ro H.A. Rosbach, Bambleveien 2, 3700 Skien. Tel 035-21848. Poŝtkonto 8030413.
- Novzelando s-ro D.B. Pease, Unit 1, 27 a Campbell Rd, Royal Oak, Auckland 6.
- Peruo s-ino J. de Skotte, Melecon Paul Harris 335/200 Barranco-Lima 4.
- Portugalujo: s-ino Maria Teresa Nunes Constâncio, Rua Freixo Capitaó 16-2^o Dto, Aigualva - Cacem.
- Svedujo peranto: s-ro Ragnar Hjorth, Kronobergsgrt 25, S-11233 Stockholm.
- Svislando: S-ro Erik Otte, Ecole d'Humanité, CH-6082 Goldern (Hasliberg)
- Usono: S-ro Robert W Rapp 2043 Brannon S W, Austell GA 30001. Tf 404-948-8535
- Informoj pri membreco:
En landoj kun Nacia Sekcio: Informiĝu ĉe NR kaj pagu al li la kotizon.
- Individuaj membroj (nur en landoj sen N.R.): Kotizo inkl. abono:
Junuloj ĝis 18-jaraj: Ned. gld. 3.30 aŭ egalvaloro.
Pliaĝuloj: Ned. gld. 5.00 aŭ egalvaloro.
Subtenantoj: Minimume Ned. gld. 5.00 aŭ egalvaloro.
- Prefere pagu la kotizon al la kasisto: David H. Withey, 21 Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool L 22 3 ye.
- Adresoj de la Centra Komitato: Vidu la duan paĝon.
- Konstanta adreso de S.E.L.: Postbus 433, Zaandam, Nederlando.

La Skolta Mondo estas la oficiala revuo de Skolta Esperanto Ligo, kaj aperas kvarfoje en la jaro. Kontribuajtoj estu sendataj al la redaktoro, Bambleveien 2, N 3700 Skien, plej malfrue ĝis la 10.a de februaro, majo, aŭgusto aŭ novembro.

Ekspedanto de la gazeto estas la kasisto. Informu al la Nacia Reprezentanto je malĝusta adreso, nericevo k.s. Se NR ne estas en via lando, informu al la ekspedanto.

en 1979 al *Persia*,
IRANO



LA SKOLTA MONDO REDAKCIO: *Bambleveien 2*
N 3700 *Skien*.

NE ISSN 0037 6558

